

KATOLIKA SENTO

Periodico dell'Unione Esperantista Cattolica Italiana (UECI)

www.ueci.it

"Per la promozione della fratellanza e della comprensione tra i vari popoli di diverse lingue" (Paolo VI)

Periodico bimestrale - Reg. trib. di Vercelli 22.12.1997 n. 306 -
Sped. in abb.post. art. 2 comma 20/c L662/96 - filiale di Vercelli -
Direttore resp.: Mons. Gianni Ambrosio - Dir. e amm.: Vercelli, via Benadir, 62
tipografia edizioni **SAVIOLO** s.n.c. - Vercelli

Anno 90 - n. 4
LUGLIO-AGOSTO 2011

25a Kongreso de UECI (Santa Giustina: 3-6 Junio 2011)

De vendredo la 3a ĝis mar-
do la 7a de Junio, okazis en
Santa Giustina, komunumo
de la provinco Belluno, ĉe
"Centro Papa Luciani", la
25a kongreso de UECI, al kiu
aliĝis entute 59 kongresanoj
el diversaj italaj regionoj, sed
nur 49 el ili efektive partoprenis kaj aliaj 7 alvenis nur

por la jara asembleo de UECI.
Aliĝis ankaŭ tri sacerdotoj
kiuj certigis la celebren de la
ĉiutaga Meso. Bedaŭrinde
ankaŭ ĉijare ne povis partopreni
nia eklezia asistanto
mons-ro Giovanni Balconi,
pro siaj gravaj taskoj ĉe la

Diocezo de Milano.

En la kongresejo estis je
nia dispono, krom la dormo-
ĉambroj, preĝejo kaj granda
salono ekipita de ĉiuj moder-
naj aparatoj por niaj prelegoj.
La partoprenantoj povis ĝui
grandan ĝardenon kun buntaj
floroj kaj belan vidon sur la



Santa Giustina - Centro Papa Luciani: Grupo de kongresanoj

(foto G.Daminelli)

ĉirkaŭaj montoj. Ĉijare la temo de nia kongreso estis: *“Ni atendas novan ĉielon kaj novan teron (2Pet 3,13)”*.

La kongreso komenciĝis vendredon la 3an de Junio posttagmeze kun la alveno de la kongresanoj, la komuna vespermanĝo kaj la interkona vespero, kiu finiĝis per kompletorio.

La sekva tago, sabato, komenciĝis per la Matenaj Laŭdoj, kaj, post la matenmanĝo, je la naŭa kaj duono, okazis la oficiala malfermo per la saluto de la prezidanto Giovanni Daminelli. Tuj poste sekvis la unua prelego pri la kongresa temo “Ni atendas novan ĉielon kaj novan teron” fare de frato Pierluigi Svaldi. Poste Ida Bossi prelegis itallingve pri “La kristana Espero”. Per simplaj vortoj kaj belaj bildoj la oratorino gvidis la aŭskultantojn en la eltrovo de la espero en la ĉiutaga vivo.

Post la tagmanĝo ŝi pri-traktis la kristanan esperon el alia vidpunkto per prelego titolita “Sufero kaj Espero”. Poste Daminelli enkondukis la historian flankon de nia temo per resuma kronologio de la eventoj de la itala releviĝo memore de la 150a jariĝo de la nacia unuigo. Tiu temo estis disvolvita de Norma Cescotti kaj de Daminelli mem, kiuj prezentis la biografiojn de du personoj, Cavour kaj Garibaldi, kiuj rolis tre grave por la Unuigo de Italio. La prelegantoj ne nur

parolis pri la vivo de la du personoj, sed precipe pri la esperoj, kiujn ili donis al la italaj popoloj, tiutempe ankorau ne unuigintaj en unika nacio.

Sekvis la kutima skeĉo de Gianni Conti, ĉijare titolita: “La ĉasisto de nuboj”.

Vespere okazis la muzika spektaklo de la kantisto Manŭel (Emanuele Rovere), kiu kantis malnovajn italajn kanzonojn esperantigitajn de li mem. Manŭel disdonis la KD-n de siaj kanzonoj por

kolekti monon favore de la neprofitocela organizo “*Evidente*”, kiu kuracas senpage la blindulojn en kelkaj malriĉaj landoj.

Dimanĉon matene, post la matenaj laŭdoj kaj la matenmanĝo, okazis la Jara Asembleo de UECE. Laŭ la tagordo, la prezidanto legis la protokolon de la asembleo de la pasinta jaro kaj prezentis la moralan kaj finanĉan raportojn, kiuj, post mallonga pridiskuto, estis unuanime apro-



Fr. Pierluigi enkondukas la kongresan temon (foto Ida Bossi)

bitaj tiel, kiel estis aprobita ankaŭ la proponita budĝeto por la venonta jaro. Oni decidis kongresi la venontan jaron en Piemonto kaj oni donis al la estraro la taskon trovi la taŭgan lokon. La prezidanto informis la anojn pri la altigo de la poŝtaj tarifoj por la sendado de la revuo *Katolika Sento*, pro tio, la tipografio akceptis redukti la eldon-nombrojn de la revuo al 300 ekzempleroj, kondiĉe ricevi la tekston de la revuo jam enpaĝigita. Pro tio nun la prezidanto mem zorgas pri la enpaĝigo.

Posttagmeze okazis ekskurso al Canale d'Agordo kaj al Lago de Allege. Canale d'Agordo estas vilaĝeto, kie naskiĝis Papo Johano Paŭlo la 1a. Lia papado daŭris nur 33 tagojn. Tie ni vizitis la preĝejon, dediĉitan al Johano la Baptisto, kie oni povis admiri la altaron el ligno de la skulptisto Dante Moro. La skulptaĵoj de la altaro prezentas la plej gravajn momentojn de la vivo de la Papo. Tie la skulptisto reprezentis la Papon en la momento, en kiu li donas la mitron al infano. La paroĥestro kaj juna virino parolis pri la vivo de la Papo en la vilaĝeto, rakontis la historion de la preĝejo kaj preĝigis nin antaŭ la statuo de la Papo. Poste ni vizitis la apudan muzeon titolitan al la Papo, kie ni povis spekti mallongan filmon kaj vidi objektojn, dokumentojn kaj



Carlo Sarandrea dum li priskribas la lokojn de la katastrofo.

bildojn. Fine ni ekskursis al Lago de Allege ĉe la piedoj de monto *Civetta*. Ni promenis sur la stratoj de la vilaĝeto por admiri la belajn montarajn domojn plibeligitajn per plurkoloraj floroj, kaj laŭ la bordo de la lago, kies akvoj estis klaraj kaj trankvilaj.

Post la vespermanĝo okazis la kutima vespera renkontiĝo, dum kiu la partoprenantoj spektis filmadon pri la antaŭjuĝoj de la itala popolo.

Lundo komenciĝis kiel kutime per la matenaj laŭdoj kaj matenmanĝo. Poste profesoro Giordano Formizzi parolis pri “Federismo: Estonteco de la mondo”. La prelego estis tiel interesa, ke neniu atentis ĝian longecon. Ĉiuj petis la profesoron daŭrigi sian prelegon. Poste Carlo Sarandrea legis la pretigitan prelegon de profesoro Carlo Minnaja pri Bruno Migliorini, fama esperantisto

de tiu regiono.

Post la tagmanĝo ni ekskursis al la Digo de Vajont, kie en la jaro 1963 okazis granda katastrofo, kiu mortigis 1910 personojn. La digo estas monumento por memori al la tuta mondo, ke ni devas respekti la naturon. Bonŝance la pluvo ĉesis tuj kiam ni eliris la aŭtobuson por admiri kaj foti la grandiozan digon kaj la teruran terfalon, kiu elbordigis la akvon. Poste ni vizitis la faman urbeton Cortina, kiu estas somera kaj vintra stacio. Malgraŭ la oftaj momentoj de pluvo, dum la ekskursoj la vetero estis agrabla kaj la montara panoramo superba.

Mardo estis la tago de la foriro. Kelkaj foriris matene, aliaj post la tagmanĝo. La estraro profitis de la libertempo por sia renkontiĝo.

Ĝis revido la venontan jaron.

Tiziana Fossati

Santa Giustina: kantas Manŭel Muzika vespero favore de “EVIDENTE”

Nia kongreso entenas ankaŭ distrajn momentojn, kiaj estas la vesperaj renkontiĝoj. Sabaton vespere, la kantisto Manŭel (Emanuele Rovere) amuzigis nin per dekduo de malnovaj italaj kanzonoj esperantigitaj

de li mem. La publiko tre ŝatis la spektaklon kaj kelkaj eĉ ekdancis entuziasme. Je la fino li disdonis al ĉiuj la KoDo-n kun siaj kanzonojn. La ujo de la disko, entenis etiketon sur kiu estis skribite:



Pagon de la disko, aŭ libera oferton sendu al “EVIDENTE” neprofitcela, bonfara Organizo, kiu kuracas senpage blinduloj, kaj en Kinshasa (R.D. Kongo) estras lernejon por malriĉaj, blindaj infanoj, prizorgataj de Volontuloj Esperantistoj.

Pro tio ni kolektis 500 eŭrojn, kiujn ni tuj sendis al

“EVIDENTE”. Pri kio temas? Ĝi estas asocio fondita en 1966 de la nederlanda esperantisto **Jacques Tuinder**. Li estis interalie prezidanto de IKUE de 1966 ĝis 1971 kaj prezidanto de KELI de 2000 ĝis 2004. Sed li estas fama precipe pro la fondo en 1966 de la jama “Agado E3”, kiuj poste iĝis “EVIDENTE”, kiu zorgas pri la okul-kuracado en la malriĉaj landoj, kie milionoj da homoj iĝas blidaj senbezone.


Sube oni povas legi tri retmesaĝojn ĝis la lasta dolora anonco.

Giovanni Daminelli

09/06/2011 *Estimata Jaques Tuinder,*

dum nia kongreso, okazinta en Santa Giustina da la 3a ĝis la 7a de Junio, la E-kantisto Emanuele Rovere (Manŭel) venis ĉe ni por prezenti siajn kanzonojn en Esperanto kaj disdonis al ĉiuj sian KDn ŝange de libera kontribuado al via organizo EVIDENTE. Entute ni kolektis 500 eŭrojn, kiujn mi hodiaŭ akreditis sur via banka konto.

Korajn salutojn, Giovanni Daminelli



Jacques Tuinder

11/06/2011 *Kara sinjoro Daminelli,*

hodiaŭ mi (lacega) revenis el Tanzanio, kie mi dek tagojn kun du oftalmologiaj asistantinoj kaj du optikistoj fervorege laboris (nin konsultis ĉirkaŭ mil pacientoj). La bezonegoj estas nepriskribeblaj. Ni okulmezuris i.a. en blindulejo; kiam kelke da junaj pacientoj ricevos siajn okulvitrojn, ili povos forlasi tiun mizere plorigan instituton (mankas la plej esencaj lerniloj!) ĉar jam multe pli bone vidas... Por via donaco mi ege dankas kaj aparte tion faros al kara Emanuele. La ĉielo vin benu. Via helpo venas en la gusta momento, kiam ni devos pretigi preskaŭ 400 laŭ-receptajn okulvitrojn! Ni vidis amason da kataraktuloj kaj multas okulistoj... Ni revenos por operacie kompati ilin.

Dankoplene kaj kore via, Jacques

19/06/2011

Ni ege bedaŭras, ke Jacques Tuinder subite mortis dum la nokto de la 18a de junio 2011. Vera Flip kaj Jef



MALFERMITAJ AL LA TUTA MONDO

Rubriko zorge de frato Pierluigi Svaldi

Dio è comunione

Nella vita di tutti i giorni, quello di cui abbiamo veramente sete, è la comunione fra noi. Andare in pizzeria significa sedersi attorno allo stesso tavolo e consumare assieme una pizza a seconda dei gusti. La famiglia, che si ritrova dopo le varie attività della giornata, sente il bisogno di porre il segno della comunione, consumando insieme lo stesso pasto, dove ognuno occupa il posto che gli compete.

In un mondo come il nostro, dove ognuno spesso si sente invincibile e si propone in modo troppo autoreferenziale, è necessario che ci siano segni di comunione e proposte concrete di attenzione al gruppo e alla comunità. I primi cristiani, infatti, come abbiamo già visto, *«erano assidui nell'ascoltare l'insegnamento degli apostoli e nell'unione fraterna, nella frazione del pane e nelle preghiere»* (Atti 2, 42). Oltre all'ascolto attento della parola, erano assidui nella comunità. In altre parole si trovavano frequentemente insieme perché fosse chiaro che in Dio nasce la comunità: una comunità di pensiero in quanto erano tutti attenti al dono proveniente dall'alto; una comunità di vita, fino alla condivisione dei beni materiali, per manifestare la risposta consenziente di quanti hanno detto sì a Dio. Oggi, i conventi di frati o di suore, dislocati nei vari territori, come pure le parrocchie, sono segni evidenti di questa risposta che l'uomo è chiamato a dare, in ogni tempo: segni che non devono mai

Dio estas kunuleco

En la ĉiutaga vivo, tio je kio ni vere soifas, estas la kunuleco inter ni. Iri al picejo signifas sidi ĉirkaŭ la sama tablo kaj kune manĝi picon laŭ la gustoj. La familio, kiu renkontiĝas post la dumtagaj diversaj aktivadoj, sentas la bezonon starigi la signon de la kunuleco, manĝante kune la saman manĝon, kie ĉiu okupas sian lokon, kiu lin koncernas.

En mondo, kia estas la nia, kie ĉiu ofte sin sentas nevenkebla kaj sin proponas tro memreference, estas necese havi signojn de kunuleco kaj konkretajn proponojn de atentemo pri la grupo kaj pri la komunumo. La unuaj kristanoj, fakte, kiel ni jam vidis, *«aŭskultis konstante la instruojn de la apostoloj, vivis kune kiel fratoj, partoprenis en la dispecigo de pano kaj en preĝado»* (Agoj 2, 42). Krom la atenta aŭskulto de la vorto, ili ofte partoprenis en la komunumo. Alivorte ili tre ofte troviĝis kune, por ke estu klare, ke en Dio naskiĝas la kunuleco: penso-kunuleco ĉar ĉiuj atentis la donon devenantan de la alto; vivo-kunuleco, ĝis la kunpartigo de la havaĵoj, por manifesti la jesan respondon de ĉiuj, kiuj jesis al Dio. Hodiaŭ la monaĥejoj aŭ monaĥinejoj, ĉeestantaj en la diversaj teritorioj, samkiel la paroĥoj, estas klaraj signoj de ĉi tiu respondo, kiun la homo estas alvokata doni, ĉiutempe: signoj neniam mal-

sparire dai nostri occhi, perché, come si dice, «lontano dagli occhi, lontano dal cuore».

Un celebre inno che san Paolo ha inserito nella sua lettera ai Filippesi, ci invita ad avere in noi «*gli stessi sentimenti che furono in Cristo Gesù, il quale spogliò se stesso, assumendo la condizione di servo*» (Fil. 2, 5.7), tanto da non considerare niente come proprio. E il libro degli Atti offre la risposta concreta: «*La moltitudine di quelli che avevano creduto era d'un sol cuore e di un'anima sola; non vi era chi dicesse sua alcuna delle cose che possedeva ma tutto era in comune tra di loro*» (At. 4, 32). In un tempo come il nostro, dove la libertà personale viene considerata come un idolo, dove ognuno cerca di mettersi in evidenza, è importante inserire nella società un segnale contrario che ne favorisca l'equilibrio: il segno della comunità. Ma l'importanza della comunità deriva soprattutto dal fatto che noi crediamo in un Dio che è Trinità, che è, egli stesso, comunione di tre Persone uguali e distinte. Una fede vera crea sempre delle realtà concrete sulla terra, almeno per essere un segno di speranza, in aiuto alla poca fede di cui siamo portatori.

San Francesco d'Assisi, alla fine della sua esperienza spirituale confessò la sua "fede nelle chiese", in quanto abitate dal Santissimo Sacramento e luoghi dove viene espressa la convocazione in assemblea, anticipo della comunione dei santi nel cielo.

"Assidui nell'unione fraterna" erano i primi cristiani. "Samideani" sono gli esperantisti che allacciano amichevoli contatti e formano associazioni. Infatti, lì dove c'è un solo Padre, tutti sono fratelli. E quando avvertiamo la chiamata ad essere veramente fratelli, lì c'è un solo Padre, che ci convoca in comunità.

aperendaj for de niaj okuloj, ĉar, laŭ la onidiro, «for de la okuloj, for de la koro».

Fama himno, kiun sankta Paŭlo enmetis en sian leteron al la Filipianoj, invitas nin havi en ni mem «*la samajn sentojn, kiuj estis ankaŭ en Kristo Jesuo, kiu malplendigis sin ĝis la sklaviĝo*» (Fil. 2, 5.7), tiom ke nenio estu konsiderata kiel propraĵo. Kaj la libro de la Agoj proponas la konkretan respondon: «*La komunumo de la novaj kredantoj estis unukora kaj unuanima; kaj tiuj, kiuj ion posedis, ne rigardis tion kiel sian propraĵon, sed ĉion ili havis komuna*» (Ago. 4, 32). En tempo kia la nia, en kiu la persona libereco estas konsiderata kiel idolo, en kiu ĉiu klopodas sin elmontri, gravas enŝovi en la socion kontraŭan signon favore al ekvilibro: la signon de la kunuleco. Sed la graveco de la kunuleco devenas ĉefe de la fakto ke ni kredas je Dio kiu estas Triunuo, kiu estas, Li mem, kunuleco el tri Personoj egalaj kaj apartaj. Vera fido kreas ĉiam konkretajn realaĵojn surtere, almenaŭ por esti signo de espero, subtene al la malgranda fido, kiun ni liveras.

Sankta Francisko el Asizo, je la fino de sia spirita travivaĵo, konfesis sian "fidon en la preĝejoj", ĉar ili estas loĝataj de la Sanktega Sakramento kaj estas lokoj, kie manifestiĝas la kunveno en asembleo, kiel antaŭanonco de la komunumo de la sanktuloj en la ĉielo.

"Persistaj en la kunuleco" estis la unuaj kristanoj. "Samideanoj" estas la esperantistoj, kiuj starigas amikajn rilatojn kaj estigas asociojn. Fakte, tie kie estas ununura Patro, ĉiuj estas fratoj. Kaj kiam ni perceptas la alvokon al vera frateco, tie ĉeestas ununura Patro, kiu arigas nin en kunulecon.

Dirite inter ni ...



007

KOMENCIĜAS LA LECIONO

- Nu, ni havas ĉion por la traduko.
- Jes, ni havas ĉion, sed post kelkaj minutoj komenciĝos la leciono kaj ni devos ĝin ĉeesti.
- Ni faru tion: ni klopodu daŭrigi la tradukon dum la leciono, se la profesoro permesos tion.
- Mi opinias, ke ne estos problemoj: ĉi laboro rilatas la tutan lernejon.
- Jes, mi scias. Sed mi ne scias ĉu ĉiuj profesoroj samopinias.
- Tio estas vera. Tamen, la profesorino pri matematiko bone komprenos la aferon. Ŝi generale akompanas la lernantojn eksterlanden.
- Vi pravas; tion ŝi faris ankaŭ la pasintan jaron.
- Dume, ni profitu por komenci.

- Ni komencu.
- Tereza, vi estu preta kun la vortaro sub la okuloj.
- Kaj Serena komencu legi la tekston.
- Mi havas ĉion por skribi la tradukon.

- Jen, alvenas la unuaj.
- Ni ĉesu momenton.
- Saluton.
- Saluton, Johano.
- Bonan matenon.
- Saluton.
- Bonan tagon.
- 'tagon.
- Hola, kiel vi fartas?
- Bone. Ni laboris ĝis nun.
- Ĉu vi bone progresis kun tiu traduko?

INIZIA LA LEZIONE

- Ebbene, abbiamo tutto per la traduzione.
- Sì, abbiamo tutto, ma fra alcuni minuti inizierà la lezione e noi dovremo parteciparvi.
- Facciamo così: cerchiamo di continuare la traduzione durante la lezione, se il professore lo permetterà.
- Credo che non ci saranno problemi: questo lavoro riguarda tutta la scuola.
- Sì lo so. Ma non so se tutti i professori la pensano allo stesso modo.
- Questo è vero. Tuttavia la professoressa di matematica capirà bene il problema. Lei di solito accompagna gli allievi all'estero.
- Hai ragione: l'ha fatto anche lo scorso anno.
- Nel frattempo, approfittiamo per cominciare.
- Incominciamo.
- Teresa, stai pronta con il vocabolario sotto il naso.
- E Serena inizi a leggere il testo.
- Ho l'occorrenza per scrivere la traduzione.

- Ecco, arrivano i primi.
- Smettiamo per un momento.
- Salve.
- Salve, Giovanni.
- Buon mattino.
- Salve.
- Buon giorno.
- 'ngiorno.
- Salve, come state?
- Bene. Abbiamo lavorato fino ad adesso.
- Siete andati avanti bene con quella traduzione?

- Ni ĵus komencis ĝin.
- Ĉu ĝi estas malfacila?
- Ne, ĝenerale ĝi estas facila.
- Bonan laboron!
- Dankon.
- Nedankinde.
- Sed, se vi volas, vi povas kunlabori.
- Vi scias, ke mi ne estas tro lerta rilate la germanan.
- Mi scias: ĉi tiu estus bona okazo por praktiki ĝin.
- Tion mi volonte farus, sed mi devas dediĉi mian tempon al aliaj studobjektoj pri kiuj mi baldaŭ ekzamenotos.
- Vi pravas. Bonan studadon.
- Ha, jen la profesorino.
- Ĉu vi iru paroli kun ŝi, Serena?
- Ĉu mi?
- Jes, sed se vi ne volas, iros mi.
- Ne, iros mi.

- Pardonu, profesorino.
- Bonvolu: kion vi deziras?
- Ni ricevis leteron el Germanujo.
- Pri kio temas?
- Estas invito interŝanĝi viziton.
- Bone, ni faros.
- Sed, ni devas traduki la leteron.
- Ĉu la tuta klaso? Nun?
- Ne, ni estas triopo, kaj ni jam komencis. Ni volus daŭrigi la tradukon dum la leciono.
- Ĉu ĝi estas urĝa?
- Sufiĉe.
- Kiuj formas la triopon?
- Karlo, Tereza kaj mi mem.
- Akordite, nur iru ekster la ĉambron.
- Dankon, profesorino.
- Atentu, tamen: akordiĝu kun iu el viaj samklasanoj, ke tiu klarigu al vi la novan lecionon.
- Certe, ni faros. Denovan dankon.

- L'abbiamo appena incominciata.
- È difficile?
- No, in generale è facile,
- Buon lavoro!
- Grazie.
- Prego.
- Ma, se vuoi, puoi collaborare.
- Sai che non sono troppo bravo per quanto riguarda il tedesco.
- Lo so: questa sarebbe una buona occasione per praticarlo.
- Lo farei volentieri, ma devo dedicare il mio tempo ad altre materie nelle quali sarò esaminato presto.
- Hai ragione. Buon studio.
- Ah, ecco la professoressa.
- Vuoi andare a parlare con lei. Serena?
- Io?
- Sì, ma se non vuoi, vado io.
- No, vado io.

- Scusi, professoressa.
- Dimmi: cosa vuoi?
- Abbiamo ricevuto un lettera dalla Germania.
- Di che si tratta?
- È un invito a fare uno scambio di visite.
- Bene, lo faremo.
- Ma dobbiamo tradurre la lettera.
- Tutta la classe? Adesso?
- No, siamo in tre, ed abbiamo già iniziato. Vorremmo continuare la traduzione durante la lezione.
- È urgente?
- Abbastanza.
- Chi forma il terzetto?
- Carlo, Teresa ed io stessa.
- D'accordo, però andate fuori dall'aula.
- Grazie, professoressa.
- Ma, attenti, mettetevi d'accordo con qualche compagno di classe perché vi spieghi la nuova lezione.
- Lo faremo certamente. Grazie ancora.

FINIĜAS LA LECIONO

- Nu, estas finiĝonta la leciono, ne donu al ni hejmajn taskojn, profesoro.
 - Ne, mi ne donos al vi hejmajn skribitajn taskojn. Sed vi memoru, ke vi devas preskaŭ parkeri la tekston de la 45.a ĝis la 60.a paĝo de nia libro, se vi volas ricevi sufiĉan noton en la trimonato.
 - Dankon, ni studos tre atente.
 - Jen la trililo. La leciono finiĝis.
 - Bone, ni iru.
 - Ĉu vi prenis ĉiujn viajn aferojn, Johano?
 - Jes, ĉion mi kunprenis.
 - Lasu, ke mi kontrolo pri la miaj kaj mi venos.
 - Rapidu, aŭ mi maltrafos mian trajnon.
 - Ĉu vian trajnon?
 - Jes, mian trajnon.
 - De kiam vi hejmeniras per trajno?
 - Mi ne iros hejmen, hodiaŭ. Mi iros al mia avino.
 - Ĉu al via avino?
 - Jes, al mia avino.
 - Kial?
 - Ĉar nek mia patrino nek mia patro estas hejme.
 - Ĉu vi ne povas resti sola?
 - Jes, sed estas la problemo de la tagmanĝo kaj tiu de la vespermanĝo.
 - Vi pravas, via avino estas certe pli kapabla ol vi en la preparo de la manĝaĵoj.
 - Kaj mi, kiel vi scias, devas studi sufiĉe multe.
 - En tio vi pravas, ĉar ni ĉiuj havas multon por studi.
 - Bone, ĉu vi akompanu min ĝis la stacidomo?
 - Jes, volonte.
- ***
- Bonan tagon.
 - Bonan tagon.
 - Mi dezirus bileton al Novate.
 - Ĉu por hodiaŭ?

FINISCE LA LEZIONE

- Ebbene, sta per finire la lezione. Non ci dia compiti per casa, professore,
 - No, non vi do compiti scritti per casa. Ma ricordatevi che dovete imparare quasi a memoria il testo da pagina 45 a pagina 60 del nostro libro se volete avere la sufficienza per il trimestre.
 - Grazie, studieremo con molta attenzione.
 - Ecco il campanello. La lezione è finita.
 - Bene, andiamo.
 - Hai preso tutte le tue cose, Giovanni?
 - Sì, ho preso con me tutto.
 - Lasciami controllare le mie ed arrivo.
 - Muoviti, o perderò il mio treno.
 - Il tuo treno?
 - Sì, il mio treno.
 - Da quando vai a casa in treno?
 - Non vado a casa oggi. Vado da mia nonna.
 - Da tua nonna?
 - Sì, da mia nonna.
 - Perché?
 - Perché a casa non c'è né mia madre né mio padre.
 - Non puoi rimaner solo?
 - Sì, ma c'è il problema del pranzo e quello della cena.
 - Hai ragione, tuo nonna è certamente più brava di te nella preparazione dei cibi.
 - Ed io, come sai, devo studiare abbastanza.
 - In questo hai ragione, perché noi tutti, abbiamo molto da studiare.
 - Bene, mi accompagni fino alla stazione?
 - Sì, volentieri.
- ***
- Buon giorno.
 - Buon giorno.
 - Vorrei un biglietto per Novate.
 - Per oggi?

- Certe.
- Ĉu vi deziras bileton ir-revenan?
- Kiom ĝi kostas?
- Nu ni vidu.
- Ne, bonvolu lasi la revenan bileton, ĉar verŝajne mia patro venos repreni min per aŭtomobilo
- Bone, mi donos al vi simplan, iran bileton al Novate.
- Jes, tio sufiĉas.
- Je kioma horo forveturas la trajno?
- Ĝi forveturos je la 13.15, tio estas post 6 minutoj.
- Ĉu mi sukcesos trafi ĝin?
- Jes, se vi rapidas, vi sukcesos.
- Bone, dankon, mi kuros.
- Sed, prenu vian bileton, kaj pagu ĝin.
- Ha, jes, vi pravas.
- Senbilete oni pagas monpunon sur la trajno.
- Ĉu vi havas la reston de 10 eŭroj?
- Lasu min kontroli.
- Jes, mi havas. Sed, donu al mi 20 cendojn.
- Dudek cendojn?
- Jes, dudek cendojn, se vi ilin havas.
- Jes, mi devas ilin havi en iu poŝo.
- Ĉu vi trovis ilin?
- Mi trovis 50.
- Tio ne helpas.
- Ha, jen; ĉi tie estas dek kaj... en la alia poŝo estas du pecoj de kvin cendoj.
- Grandioze.
- Per pacienco oni ĉiam sukcesas.
- Sed se vi ne kuras, vi maltrafos la trajnon.
- Ne, mi kuregos, ĉar mi devas sukcesi trafi ĝin.
- Ĉiam je la lasta momento!
- Saluton.
- Saluton.
- Bonan vojagon.
- Dankon.
- Ĝis morgaŭ!
- Ĝis morgaŭ matene!
- Certamente.
- Desidera un biglietto di andata e ritorno?
- Quanto costa?
- Ebbene, vediamo.
- No, lasci per piacere il biglietto di ritorno perché probabilmente mio padre verrà a prendermi con l'automobile.
- Bene, le darò un biglietto di semplice andata per Novate.
- Sì, è sufficiente.
- A che ora parte il treno?
- Parte alle 13.15, cioè fra 6 minuti.
- Riuscirò a prenderlo?
- Sì, se si affretta, riesce a prenderlo.
- Bene, grazie, corro.
- Ma prenda il suo biglietto, e lo paghi.
- Ah, sì, ha ragione.
- Senza biglietto si paga la multa sul treno.
- Ha il resto di 10 euro?
- Mi lasci controllare.
- Sì, ce l'ho. Ma mi dia 20 centesimi.
- Venti centesimi?
- Sì, venti centesimi, se li ha.
- Sì, devo averli in qualche tasca.
- Le ha trovate?
- Ne ho trovati 50.
- Questo non m'aiuta.
- Ah, ecco, qui ce ne sono dieci e... nell'altra tasca ci sono due pezzi da cinque.
- Meraviglioso .
- Con la pazienza si riesce sempre.
- Ma se non corre, perderà il treno.
- No, correrò veloce, perché devo riuscire a prenderlo.
- Sempre all'ultimo momento!
- Arrivederci.
- Arrivederci.
- Buon viaggio.
- Grazie.
- A domani!
- A domattina!



Nia eta Parnaso



Rubrica dedicata alla Poesia

Rubriko dediĉita al Poezio

FERMARE IL TEMPO.

*In cima a questo monte altissimo,
freccia lanciata verso Dio,
ai miei piedi il mondo.*

*Mi ergo,
come su un trono d'aria,
le braccia tese
verso l'infinito,
raccolgo
sulla punta delle mie dita
l'energia del cosmo
che scende nel mio petto col respiro
e lo acquieta.*

*Sono avvolta di luce,
la bellezza mi veste,
sono nell'infinito.
Oh! Quanto sei bello mondo!
Fermare il tempo...
Il non ritorno al nulla.
E fondermi col tutto.*

HALTIGI LA TEMPON!

*Ĉe la supro de ĉi – altega monto,
sago ĵetita al Dio,
je miaj piedoj la mondo.*

*Mi elstariĝas
kvazaŭ sur aera trono,
la brakoj etenditaj.
al la senfino,
mi kaptas
sur pintoj de miaj fingroj
la kosman energion
kiu enigas en mian bruston kun la spiro
kaj ĝin kvietigas.*

*La lumo min envolvas,
la beleco min vestas,
mi estas en la senfino.
Ho! Kiom bela vi estas, mondo!
Haltigi la tempon...
La nereveno al nuleco.
Kaj min fandi kun la tuto.*

Anna Amorelli Gennaro

(esperantigis Norma Cescotti)

SCIIGOJ EL AFRIKO

*Rubrica rivolta alle notizie dal mondo esperantista africano.
Rubriko celanta doni sciigojn el Afrika Esperantujo.*

R. D. DEL CONGO

Rutshuru:



Al pastro Duilio Magnani

Kiel antaŭanoncite, de la 17a ĝis 20a de Aprilo en Rutshuru Emanuelo Muchuti starigis seminarion memore de la morto de pastro Duilio Magnani. En tiu okazo oni baptis per nomo Duilio la ĵusnaskitan filon de Emanuelo.

Dum la ceremonio memore de pastro Duilio parolis Emanuelo mem, la urbestro kaj la reprezentanto de la tiea misiono de Unuiĝintaj Nacioj. Poste oni festis per dancoj kaj bankedo.

Ĉe la orfejo de Rutshuru, la lernejo en kiu oni instruas ankaŭ Esperanton, estis nomumita "Duilio Lernejo" kaj, por memori al la infanoj ilian spiritan patron Duilio, ĉe

la lernejo estis lokitaj du malgrandaj monumentoj el argilo unu dediĉita al pastro Duilio kaj la alia al Sankta Patro Pio.



Al S-ta Patro Pio

Kinshasa:

Jean Bosco Malanda, landa reprezentanto de IKUE en Kongo, sciinte pri la forpaso de Jacques Tuinder dissendis rete longan kaj kortuŝan mesaĝon, sube resumita (la tuta teksto estas en Ipernity:

<http://www.ipernity.com/blog/32172/332543>):

Post la forpaso de pastro Duilio antaŭ unu jaro, nun de nove kortuŝas nin la forpaso


de frato kaj patro Jacques Tuinder. Li kaj lia teamo atingis Kongon en Septembro 2010. Tiam en Kinshaso kaj Mbanza-Ngungu ili ege laboris ĉiutage kuracante entute la okulojn de 765 personoj.

Li estis tre afabla homo, ema al la interna ideo de Esperanto, laborema, preĝema, solidarema.

Li jam planis duan mision en Kongo. Multaj personoj atendis lin kaj li promesis reveni.

Dankon kara Jacques pro tio, kion vi faris kaj intencis fari por ni. Ni ankoraŭ bezonas vin, Afriko, Kongo, Solidareco kaj Agado, mi kaj viaj blindaj infanoj bezonas vin. Ni esperas ke via agado ne malaperos kun vi. Ripozu en paco kara amiko. Vivu eterne en la mano de Jesuo.

Jean Bosco Malanda



Jean Bosco kaj J. Tuinder

Il Battesimo di Gesù in rito bizantino

(Terza e ultima parte)

Al termine della Divina Liturgia, talora nella vigilia della Festa, si celebra il Rito della **Grande santificazione delle Acque**.

Mentre si va presso la fontana, o un lago, o un corso, d'acqua o il mare, il coro intona alcuni tropari. Il primo, eseguito secondo l'ottavo tono suona così:

«La voce del Signore echeggia sulle acque e dice: Su via, del Cristo apparso ricevete tutti lo Spirito di sapienza, lo spirito di intelletto, lo spirito del timor di Dio.» (o MEGAS AGHIASMOS. *Solenne Benedizione della Acque nel giorno dell'Epifania secondo il rito bizantino greco*. Palermo, s.l., p. 6. [A cura dell'Associazione Cattolica Italiana per l'Oriente Cristiano]). Come si può vedere, lo Spirito di cui si parla è proprio lo Spirito Santo, anche perché vengono menzionati tre dei setti doni.

Il secondo tropario attualizza l'azione della santificazione dell'acqua grazie all'incipit espresso dall'avverbio "simeron" (oggi) che ci vuole ricordare che non si tratta di una semplice commemorazione, ma dell'opera di economia di salvezza che continua a svolgersi per la nostra salute spirituale. È la stessa "fisis", natura che viene santificata, perché il Cristo si è immerso nel Giordano che nel tropario

seguito viene chiamato semplicemente con stupenda antonomasia "potamò" "fiume".



Un tropario rammenta l'incipit del Vangelo secondo San Matteo (Mt 1,2-3) e Malachia (3,1) sia Isaia (40, 3), l'invito del Profeta cugino di Gesù, Giovanni Battista, ma ancora San Paolo nelle Lettere ai Filippesi (2, 7) laddove Cristo appare come "servo", come colui che si abbassa, si svuota per diventare simile a noi. Riappare anche il Battista che si schernisce, in quanto si ritiene indegno di battezzare il Salvatore.

«All'invito di colui che grida nel deserto preparate la via del Signore, sei venuto, o Signore, prendendo una forma di schiavo e chiedendo il Battesimo Tu, che non hai conosciuto il pecca-

to. Ti videro le acque ed ebbero paura; fu preso da timore il Precursore ed esclamò dicendo: come la lucerna potrà illuminare la Luce? Come potrà il servo imporre la mano sul suo Signore? Santifica me e le acque, o Salvatore, Tu che togli i peccati del mondo» (o MEGAS AGHIASMOS. *Solenne Benedizione della Acque cit.*, p. 8).

Tre sono le profezie che vengono lette, tutte tratte da Isaia: 35, 1-10; 40, 1-13; 12, 3-6; a queste segue la lettura della I Epistola di San Paolo ai Corinti, 10,1-4.

Il Vangelo proclamato, tratto da San Marco (1,9-11), ci presenta Gesù che esce dall'acqua del Giordano dopo il Battesimo di penitenza, mentre lo Spirito Santo scende a forma di colomba e la voce del Padre dice che Gesù è il figlio diletto. Momento sublime in cui compaiono le tre Persone della Santissima Trinità.

Segue una grande litanìa, letta dal sacerdote o dal diacono: le prime nove richieste sono quelle che si sentono nella Liturgia e nei Vespri, le altre sono specifiche della Festa. Si invoca il Signore affinché l'acqua sia santificata, affinché "discenda su queste acque l'azione purificatrice della sovrastanziale Trinità" "Affinché noi possiamo es-

sere illuminati con il lume della cognizione e della pietà per la venuta dello Spirito Santo”

Ad ogni invocazione il coro risponde “Signore Pietà”.

La preghiera di santificazione è stupenda e ricca. Essa è rivolta alla Santissima Trinità “luce inaccessibile”, magnificata dal sacerdote, conscio della propria indegnità e di quella del popolo. Dopo la menzione dell’assoluta bontà di Dio, si invoca ancora una volta Il Figlio di Dio “unigenito, senza Padre da parte della Madre e senza madre da parte di Padre”. La gioia attualizzata dall’“oggi”, che ci rende contemporanei al momento della salvezza, non si limita alle creature, ma anche a coloro, che, eletti, sono già assunti nella gioia: «Oggi è giunto il tempo della Festa, e il coro dei santi si riunisce a noi e gli Angeli fanno festa assieme agli uomini»

L’immersione di Gesù nel Giordano infonde la grazia: «Egli infatti vi sommerge la morte della trasgressione, il pungolo dell’errore, il collegamento con l’inferno, e dà al mondo il battesimo di salvezza.» (O MEGAS AGHIASMOS. *Solenne Benedizione della Acque cit.*, p. 23).

Segue un’acclamazione proclamata per tre volte dal sacerdote, che si volta prima al centro, poi a sinistra ed infine a destra, che ma-

nifesta l’ineffabilità del Salvatore: «Grande sei, o Signore, e prodigiose sono le opere Tue, e nessuna parola può essere sufficiente ad inneggiare le Tue meraviglie.» (O MEGAS AGHIASMOS. *Solenne Benedizione della Acque cit.*, p. 23).

La preghiera che segue manifesta la creazione ex nihilo, la presenza dei quattro elementi, l’alternarsi delle stagioni, la lode della creazione a Dio che ricorda il salmo 103, la lode delle potenze angeliche, ma anche la misericordia che si manifesta con l’Incarnazione e la santificazione del Seno verginale della madre di Dio. La forza di amore fa sì che Cristo abbia voluto vivere accanto agli uomini, schiacciando - e quest’affermazione riecheggia un’antica credenza ebraica - la testa dei dragoni annidati nel Giordano.

Nella preghiera seguente si inizia l’Epiclesi, ossia la preghiera che si fa affinché il Santo Spirito discenda sull’acqua.

I cenni mirabili all’azione salvifica non possono trascurare l’amore manifestato anche nell’Antico Patto. Ecco che due figure appaiono nel testo: Noè: “Tu sei il Dio nostro che ha annegato il peccato al tempo di Noè” (Gn 6,13-7,24) e Mosè (liberatore dall’Egitto del Faraone(14,15-30) le acque ed infine Elia che “ha libera-

to Israele dall’errore di Baal (1 Re, 18, 20-40), rammentando qui il miracolo del Monte Carmelo.

Segue un’altra epiclesi: «Tu stesso anche ora, o Signore, santifica quest’acqua col Tuo Santo Spirito» (O MEGAS AGHIASMOS. *Solenne Benedizione della Acque cit.*, p. 7).

Dopo altre preghiere, segue l’immersione della croce nell’acqua per tre volte il tropario «Mentre Tu eri battezzato nel Giordano...» (cfr. *Il Battesimo di Gesù, Katolika Sento* Anno 90, n.2, Marzo Aprile 2011, p.14) che è lo stesso che intona il sacerdote quando inizia la benedizione delle case, che inizia proprio con la festa dell’Epifania.

Va segnalato che in alcune comunità orientali si usa far discendere una colomba in ricordo della discesa dello Spirito Santo.

I fedeli sono aspersi con l’acqua santificata e possono portarla con sé in recipienti portati da casa.

Al ritorno in chiesa segue un tropario che sintetizza l’Economia di Salvezza e nel contempo invita i fedeli ad attingere “l’acqua con gioia... perché la grazia dello Spirito, a coloro che fedelmente ne attingono viene concessa invisibilmente da Cristo Dio e Salvatore delle nostre anime.” (O MEGAS AGHIASMOS. *Solenne Benedizione della Acque cit.*, p. 31-32).

(fine)

Giuseppe Munarini

MULTE DA DANKOJ

(Riportiamo qui sotto le offerte raccolte durante il 25° congresso UECEI di Santa Giustina - per motivi di riservatezza diamo solo la sigla del nome e la provincia)

A favore dell'associazione EVIDENTE, offerte per il CD di Manùel:

Nome	Prov.	€	Nome	Prov.	€	Nome	Prov.	€	Nome	Prov.	€
L.S.	TN	50,00	U.T.	TN	20,00	M.G.	RN	15,00	P.A.	VE	15,00
F.C.	BS	20,00	T.F.	MI	20,00	G.Z.	MI	20,00	F.O.	VC	20,00
G.G.	TV	30,00	E.B.	BO	20,00	A.B.	MI	50,00	G.D.	MI	20,00
F.T.	VI	10,00	S.B.	TV	30,00	M.M.	TN	10,00	G.G.	MI	10,00
N.C.	TN	15,00	MR.B.	MB	15,00	I.B.	MI	5,00	G.F.	PD	20,00
L.D.	BG	15,00	A.R.	RN	20,00	A.V.	MI	10,00	L.A.	CO	30,00

Totale raccolti € 500,00 interamente versati sul C.C. dell'associazione EVIDENTE

A favore degli orfani di Goma (R.D.Congo):

Nome	Prov.	€	Nome	Prov.	€	Nome	Prov.	€
P.C.	GE	100,00	U.T.	TN	20,00	F.S.	BG	50,00
S.B.	TV	10,00	A.A.	VE	15,00	F.O.	VE	20,00

Totale raccolti € 215,00

BONDEZIROJN

Il 19 luglio 2011 il nostro associato prof. **Giorgio Rosada** di Venezia, compie 90 anni. Lo festeggiamo tutti con affetto e lo ricordiamo per le sue poesie augurali di Natale e Pasqua.

Con un po' di ritardo ricordiamo gli 80 anni del nostro ex-presidente dott. **Serio Boschin**, compiuti il 3 febbraio scorso; anche a lui vadano i nostri migliori auguri

QUOTE ASSOCIATIVE

Ass. ordinario con <i>Katolika Sento</i> (SO)	.. 21,00 €
Ass. giovane con <i>Katolika Sento</i> (SG)	.. 10,50 €
Ass. familiare senza <i>Katolika Sento</i> (SF)	10,50 €
Ass. ordinario con <i>Espero Katolika</i> (SOE)	42,00 €
Ass. sostenitore con <i>Katolika Sento</i> (SS)	.. 42,00 €
Ass. sostenitore con <i>Espero Katolika</i> (SSE)	84,00 €
Solo abbonamento a <i>Katolika Sento</i> (AK)	10,00 €
Solo abbonamento a <i>Espero Katolika</i> (AE)	21,00 €

Per i versamenti: c/c postale n. 47127675 intestato a: *Unione Esperantista Cattolica Italiana U.E.C.I*
 codice IBAN: IT66 R076 0101 6000 0004 7127 675
 Codice BIC/SWIFT: BPIITRRXXX

COMITATO CENTRALE U.E.C.I.

Presidente: Giovanni DAMINELLI,
Responsabile dei congressi: Giovanni CONTI
Vice presidente: fra Pierluigi SVALDI
Segretario/cassiere: Marco POLITI
Responsabile giovanile: Paola AMBROSETTO
Responsabile culturale: Norma COVELLI
Consulente informatico: Tiziana FOSSATI,
Consulente editoriale: Carlo SARANDREA
Assistente Eccles.: mons. Giovanni BALCONI
Grafica di Katolika Sento: Mario GUILLA
Tutte le comunicazioni alla redazione di Katolika Sento, vanno spedite al presidente UECEI:
 via Lombardia, 37 – 20099 Sesto S.Giovanni (MI)
 telef. 02.2621149 – e-mail: katolika.sento@ueci.it

AMUZE

Ĉiuj ajn rajtas kontribui sendante al ni siajn humoraĵojn, kondiĉe ke ili estu en Esperanto.



(el www.gioba.it) - sendis Tiziana Fossati

Aferoj estas aferoj

Sinjorino funebre vestita eniras anoncoficejon de ĵurnalo:

- Kiom oni devas pagi por funebra anonco?
 - Dependas de la longo. Minimume cent eŭrojn.
- Ŝi prenas la formularon kaj skribas:

"Mario Rossi mortis".

La oficisto rimarkigas al ŝi, ke por cent eŭroj, ŝi povas skribi ĝis dek vortoj.

Ŝi reprenas la plumon kaj aldonas:

"oni vendas lian aŭtomobilon en bonega stato".

Malatento

Edzino vizitas sian edzon en malliberejo:

- La advokato diris, ke kondamnos vin minimume por dudek jaroj. Vi devas nepre eskapi. Ĉu vi trovis la

fajlilon en la panbulo?

- Jes, oni operacios min morgaŭ.

En muzeo

Gardisto de naturhistoria muzeo gvidas grupon de vizitantoj kaj ĉiĉeronas:

- Ĉi tiu estas mamuta skeleto de antaŭ 15008 jaroj.
- Kiel vi scias tiel precize la aĝon de tiu mamuto?
- Ĉar kiam mi eniris ĉi tiun muzeon, antaŭ ok jaroj, oni diris al mi, ke ĝi aĝas 15000 jarojn.

Arkeologoj

Anglaj arkeologoj, elfosante je 50 metroj subtere, trovis kelkajn kuprajn dratojn. Ili pristudis ilin kaj fine asertis, ke la antikvaj britoj, jam antaŭ 6500 jaroj, havis telefonan reton.

Pro tio la usonanoj mendis al siaj arkeologoj prifosadojn en Kalifornio, kaj ili trovis je 100 metroj subtere kelkajn subtilajn fibrojn el vitro. Ili zorge pristudis ilin kaj fine asertis, ke antaŭ 12000 jaroj, la tieaj loĝantoj jam havis telefonan reton el lumfibroj.

Ankaŭ la italoj estigis arkeologiajn prifosadojn kaj atingis 200 metrojn subtere trovante nenion interesan. Pro tio ili konkludis ke la antikvaj italoj antaŭ 20000 jaroj jam uzis poŝtelefonon.

Motorciklo

Policisto haltigas motorcikliston veturantan per malnova motorciklo duon-rompita.

- Dokumentoj?
- Mi ne havas.
- Kasko?
- Mi ne havas.
- Numerplato?
- Mi ne havas.
- Retrospegulo?
- Mi ne havas.
- Kaj nun, kiel ni metas la aferon?
- Kontraŭ la muro, ĉar ĝi estas sen starigilo

Filozofado

Oni povas disdividi la vivon en tri periodoj: Revolucio, Pripensado, Televido:

oni komenciĝas volante ŝanĝi la mondon kaj finiĝas ŝanĝante la kanalojn.